

La heroo vivo de Henri Dunant, 14-a parto kaj
adiaŭo al la esperantistoj pro la ĉesigo de la elsendoj
Claude Gacond, 109-a radioprelego, 1964.12.30 & 1965.01.02

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio. Claude Gacond raportas pri la heroo vivo de Henri Dunant. Vi aŭdas la dekkvaran elsendon pri tiu temo, kaj bedaŭrinde adiaŭon al la esperantistoj pro la ĉesigo de la esperantaj elsendoj.

Karaj kaj fidelaj geaŭdantoj ! Fine de jaro oni kutime kun ĝojo diras siajn bondezirojn pro la nova jaro. Bedaŭrinde, ĉar Radio-Svislando decidis interrompi siajn esperantajn elsendojn, mi ne povas diri al vi ĝis reaŭdo en la venonta jaro 1965. Kontraŭe mi devas adiaŭi vin, en la espero povi foje rekomenci rilati kun vi pere de la mikrofono.

En tiu amara momento mi havas la impreson vidi vin dise tra tuta Eŭropo, ĉar viaj vivosignoj pruvis vian aŭskultemon. Mi eĉ komencis preskaŭ persone koni kelkajn el vi, ĉar en viaj leteroj vi ne nur menciis viajn ŝatojn kaj opiniojn, sed eĉ raportis pri viaj okupoj kaj zorgoj. Vi fariĝis vivkunuloj, kiuj, dum mi parolis antaŭ senviva mikrofono en malplena vitra studio, okupis miajn pensojn kaj homigis mian laboron.

Dum la dektri pasintaj elsendoj mi prezentis al vi la personecon de granda svisa figuro, Henri Dunant. Ni vidis en kia etoso li estis edukita. Lia financista sinteno ŝajnis al ni kritikinda, sed lia filantropa kuraĝo varbis nian admiron. Restus multo direnda pri la vivo de Henri Dunant post la fondiĝo de la Ruĝa Kruco kaj post la bankrotiĝo de la alĝeriaj muelejoj Mons-Djemila. Ni vidus kiel la mizerulo provas rememorigi sian nomon al la posteularo kaj kiel li laboras al la realigo de novaj utopiaĵoj : la starigo de monda tribunalo kaj monda registaro, la kreo de universala kaj internacia biblioteko, la proklamo de agnoskendaj homrajtoj, la militdeklaro al ĉiuj plagoj, ĉu mikrobaj, ĉu psikologiaj, kiuj semas la morton en la homaro, jen kelkaj el ili.

La intereso de similaj biografiaj studoj estas multaspekta. Vivante pense en intimeco kun herooj oni ĉerpas iom da kuraĝo al la fonto mem de la heroismo. Kio ĝenerale diferencigas la heroon de la simpla ĉiutagulo, tio estas la obeemo al la voĉo de la konscienco. Dum ĝenerale ni rezistas al la alvokoj de tiu interna voĉeto nome de miloj da sociaj kialoj, homoj kiel Henri Dunant silentigas tiujn inercifortojn por povi personigi difinitan formon de la vero.

La societo ĝenerale severas kontraŭ tiuj anoncantoj de nova soci-ordo. Tamen ĝi spirite vivas sub la ombro de la herooj de la pasinto. En la deknaŭa jarcento ĝi persekutis Henri Dunant, je la komenco de la dudeka jarcento ĝi, pere de la unua Nobel pacpremio, riparis tiun sintenon. Konsciante pri tiu procedo ni povas provi ne partopreni la premadon al la nun persekutataj novaj Henri Dunant. Estas ja facile celebri la gloron kaj kuraĝon de famulo, sed estas pli digne defendi la persekutatojn kontraŭ iliaj persekutantoj. Tiurilate ni fieras, ke ni parolis pri la agado de la usonano Martin Luther King junulo antaŭ ol la Nobel pacpremio lin metis inter la pac-heroojn. Ĉiu en sia medio povas provi rezisti al la kolektivaj persekutoj kontraŭ la nekonformistoj.

La studo de la penso de heroo devigas nin pensi, kio ne estas malmulto. Ĝi ankaŭ montras kiel rapide la homaro asimilas la pensojn de siaj herooj. Henri Dunant certe reprezentas en sia epoko unu el la herezuloj, pri kiu ĉiu stratulo rajtis moki. Pensu, li profetas la finon de la ĉiupovaj nacioj profite al internacia registaro, li diras la neceson « *inici ĉiun nacion al ĉiuj intelektaj kaj artaj manifestadoj de la aliaj popoloj* » (mi citis liajn proprajn vortojn), malfermi lernejojn eĉ en la plej malriĉaj kontinentoj, disdoni pli racie la riĉaĵojn kaj laboreblecojn inter la popoloj, ktp. Kaj hodiaŭ, plej simplaj stratuloj komencas pensi tion. Li scias, ke sen la Unuiĝintaj Nacioj jam de longe tria mondmilito estus detruinta lian urbon, li komencas konscii pri la neceso kompreni la kulturojn de la aliaj popoloj, li eĉ akceptas doni monon por la konstruo de lernejoj en plej foraj kontinentoj. La hodiaŭa stratulo pensas kiel la hieraŭa Henri Dunant. Jen kio instruas la studo de la penso de tiu heroo. Estas respondo al tiuj, kiuj neas la progreson.

La heroo vivo de Henri Dunant, 14-a parto kaj
adiaŭo al la esperantistoj pro la ĉesigo de la elsendoj
Claude Gacond, 109-a radioprelego, 1964.12.30 & 1965.01.02

Sed la hodiaŭa stratulo, kiu tiom progresis rilate la stratulon de la pasinta jarcento devas ankoraŭ multe progresi. Ni imagu la spiritan distancon, kiu lin separas de la hodiaŭaj herooj de la penso, tiel ni povas imagi, kio estos la homaro de la dudekunua jarcento.

Hodiaŭ la esperantistoj subtenas la kampajnon Oriento-Okcidento, ĉu tiu diro de Henri Dunant ne bone difinas tiun agadon : « *Temas pri organizo kaj publikigo de kolekto tiom kompleta ol eblas, de la verkoj, kiuj estas epokfaraj en ĉiuj tempoj kaj en ĉiuj landoj... La noveco de la ideo, tio estas precipe la kunordigo.* » (Fino de la citaĵo.)

Kaj jen alia profeta vido de la fondinto de la Ruĝa Kruco. Li priskribas la rolon de monda registaro :

« *Grandaĵo kaj gloraĵo por la homaro estus havi oficialan internacian Asembleon, konstantan Komitaton por la pacigado, ĉiam preta okupiĝi pri la ĝenerala bono, ĉiam disponebla pace interveni favore al la granda kaŭzo de la trankvileco kaj bonfarto de la popoloj. Kun tia konstanta Kongreso, daŭrigas Henri Dunant, kaj ĉefe kun la tempo, oni povus alveni, kun la okazaĵoj, al la diplomatio adopto de internaciaj juraj principoj kapablaj asekuri al la homaro garantiojn por daŭra paco.*

« *Paco ! Jen la sola rimedo por doni al la homaj institucioj la firmecon, kiun forto kaj arbitraĵoj al ili neniam donos.* » (Fino de la citaĵo.)

Vi aŭdis Radio-Svislandon, kiu hodiaŭ interrompas siajn esperantajn elsendojn. Parolis Claude Gacond, la sekretario de Esperanto-Edukistaro de Svislando.

-oOo-